Eŭropo Demokratio Esperanto

Protokolo de la EDE-federacia ĉefkunveno 2010

# Protokolo de la ĉefkunveno 2010 de EDE-Eŭropo

La 18an de aprilo 2010 okazis per skajpo la ĉefkunveno de la federacio Eŭropo Demokratio Esperanto.

## 1.) Interna regularo: nova kotiztipo

Voĉdon-rezultoj:

| **Interna regularo** | Sindetenas | Ne | Jes |
|---|---|---|---|
| Rezultoj (%) | 0 | 0 | 100 |

La ĉi-subaj reguloj estas aldonitaj en la internan regularon

« *Aniĝkotizo de landsekciaj membroj:*
*Ĉiuj membroj de landa sekcio de EDE estas aŭtomate membro de la federacio dum la jaro, por kiu ŝi/li kotizis al sia landa sekcio. Ĉiu nacia sekcio repagas por ĉiu membro al la Federacio aniĝkotizon modervaloran, por la jaro 2010 po 2 eŭrojn por membro. La valoro de tiu kotizo kaj la aniĝkondiĉoj estas difinitaj dum la Ĝenerala Asembleo.*

*Aniĝkotizo de homoj, ne povantaj membriĝi en nacia sekcio:*
*Rajtas membriĝi en la federacio EDE ĉiuj homoj, sed povos baloti dum demokrataj eventoj de la federacio nur kotizintaj membroj por la koncerna jaro, kiuj estas*
*- gecivitanoj de Eŭropa Unio*
*- homoj loĝantaj sur la teritorio de la Eŭropa Unio*
*La minimuma kotizprezo estas en 2010 po 2 eŭrojn por membro jare. La valoro de tiu kotizo kaj la aniĝkondiĉoj estas difinitaj dum la Ĝenerala Asembleo.* »

## 2.) Renovigo de la federacia konsilio

La federacia administra konsilio konsistas el po tri konsilianoj por ĉiu landa sekcio (Francio, Germanio, Hungario) kaj kvar konsilianoj elektitaj rekte de la membroj. La koncernaj naciaj konsilianoj jam elektis la jenajn homojn, kiel siajn reprezentantojn:

**EDE-Francio:** Elisabeth BARBAY, Bert SCHUMANN, Fabien TSCHUDY
**EDE-Germanio:** Konrad GRAMELSPACHER, Eugen MACKO, Alfred SCHUBERT
**EDE-Hungario:** Thierry SALOMON, Balázs WACHA, Andrea RUZICSKA

La EDE-membraro elektis la jenajn 4 aliajn konsilianojn laŭ la jenaj rezuloj:

| **Konsilianoj** | Sindetenas | Ne | Jes | |
|---|---|---|---|---|
| Rezultoj (%) | | | | |
| Renato CORSETTI | 0 | 0 | 100 | enpostenigita |
| Guillem GÓMEZ BLANCH | 8,7 | 0 | 91,3 | enpostenigita |
| Bertrand HUGON | 13,05 | 4,35 | 82,6 | enpostenigita |
| Bruno SCHMITT | 17,4 | 0 | 82,6 | Enpostenigita |

## 3.) Agada kaj financa raportoj

La financa kaj agada raporto estas aprobitaj.

**Aprobo** 91,3%
**Malaprobo** 0%
**Sindeteno** 8,7%

## 4.) Renovigo de la federacia estraro

La novelektita estraro konsistas el
**Prezidanto:** Bertrand HUGON
**Vic-prezidanto:** Eugen MACKO (konsilisto pri Germanujo kaj orientaj landoj)
**Sekretario:** Fabien TSCHUDY
**Vic-sekretario:** Elisabeth BARBAY
**Kasisto:** Bert SCHUMANN (konsilisto pri internaciiĝo kaj retejo)

**Aprobaj voĉoj:** 87,5%
**Sindetenaj voĉoj:** 12,5%
**Malaprobaj voĉoj:** 0%

Protokolis Fabien Tschudy,
sekretario de la federacio EDE,
la 30an de aprilo 2010

